

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso

sabaton, la 30-an de junio, 2012 • numero kvin

Hodiaŭaj eventoj

★ 8:45 atm – 12:15 ptm:
Kursoj



★ 7:30 – ??? ptm:
Eventoj en la gufujo

Brian CARPENTER

demonstros kaj instruos al ni la arton de balonskulptado! Restu poste por babili, frandi teon kaj kleriĝi.

Ĉu vi bezonas sapon?

Hoss kaj Tim havas kelkajn kromajn briketojn da sapo, se vi bezonas. Venu al ĉambraro #4.418 kaj prenu.



Limerikoj

Prahistoria limeriko

Ĉiujare kunvenis mamutoj

Por filozofiaj diskutoj.

De hom' en kaverno

Audiĝis konsterno:

“Tiuj tro lertas por esti brutoj.”

NASK-a limeriko

La eco de NASK nin impresas.

Por bona lernad', ĉio jesas.

Tostus ni, pro fiero,

Per glas' da biero,

Sed tion la ŝtat' malpermesas!

(Dankon al Ray REDD)

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 4.418

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la “gufujo” en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Ĉu gufo? strigo?

Bertilo WENNERGREN (la NASK-fantomo)

Kiam Birke provis klarigi, kio estas **gufujo**, mi rimarkis, ke multaj el vi ne scias, kio estas **gufo**.

La mallonga klarigo estas, ke **gufo** estas speco de **birdo**. Sed kiam oni montras gufon aŭ bildon de gufo, multaj pensas, ke ili vidas **strigon**. Strigo tamen estas **alia birdo**.

La problemo estas, ke **iu lingvoj** distingas inter strigoj kaj gufoj, dum **aliaj lingvoj** ne havas tian distingon. Finfine la du birdospecoj estas tre similaj, ĉar ili estas proksime parencaj.



Hinda gufo (Indian eagle-owl)

Mi estas bonŝanca, ĉar en mia denaska lingvo, la Sveda lingvo, oni distingas inter strigoj kaj gufoj. Strigon ni nomas *uggla*, kaj gufon ni nomas *uv*. Sed en la Angla lingvo oni uzas la vorton *owl* por ambaŭ birdoj.



Sud-Amerika granda gufo
(South American great horned owl)

En la Latina scienca terminologio gufoj nomiĝas *Bubo bubo*, kaj strigoj nomiĝas *Strix*. Ambaŭ kune apartenas al la familio *Strigidae*, en Esperanto **Strigedoj**. Ekzistas

pli ol cent birdospecioj, kiuj apartenas al la strigedoj. Preskaŭ ĉiujn el ili oni nomas **strigo** en ne-sciencia lingvo, kaj nur unu el ili oni nomas **gufo**. Sed tiun solan specion gufo oni tamen dividas en plurajn subspeciojn.



Lapona strigo
(Great grey owl, Lapland owl)

Kelkaj el tiuj subspecioj de gufoj troviĝas en Ameriko. Oni nomas ilin Angle *horned owls*. Gufaj subspecioj en la malnova mondo nomiĝas Angle *eagle-owls*. Tio signifas, ke principe la preciza traduko de la Esperanta vorto **gufo** en la Anglan estas *horned owl* or *eagle owl*. Sed Angla-lingvanoj simple ne faras tian distingon. Praktike ili nomas kaj **strigojn** kaj **gufojn** per la vorto *owl*.

Origine en la scienca divido inter strigoj kaj gufoj, oni klasis ĉiujn tiajn birdojn, kiuj havas **tufojn sur la oreloj**, kiel gufojn, kaj ĉiujn aliajn kiel strigojn. Tiel simpla la afero ne plu estas, sed tio tamen signifas, ke multaj gufoj ja havas tufojn sur la oreloj, dum strigoj ordinaraj ne havas tiajn tufojn.



Urala strigo (Ural owl)

Jen ekzemplo de okazo, en kiu Esperanto estas pli preciza kaj pli riĉa lingvo ol la Angla lingvo. (Kaj cetere ankaŭ la Sveda lingvo estas pli riĉa ol la Angla ĉi-okaze.)

“Kio okazas ĉe Savannah?”

de Johano BENTLEY

Savannah kaj ŝia ĝemelo, Zachary, estis treege tro frunaskitaj. Post nur 25 semajnoj, ili volis vidi la eksteran mondon, kaj informis sian patrino pri tio je la 3-a matene. Post timegiga veturo tra la urbo, kaj freneziga periodo dum kiu ni konvinkis la flegistinojn ke “ŜI JES JA NASKAS ĜUSTE NUN!”, Savannah kaj Zachary eniris la mondon. Ambaŭ estis tiel malgrandaj, ke mi povis meti mian geedziĝoringon ĉirkaŭ iliaj femuroj. Dum la sekvaj tri monatoj, ili devis resti en la malsanulejo por maturiĝi sufiĉe antaŭ ol ili povis veni hejmen. Zachary kreskis senprobleme, sed ne kompatinda Savannah. Ŝi havis multajn severajn problemojn, kaj por fari iom longan rakonton iom pli mallonga, sufiĉas diri ke ŝi travivis tri “mortojn”: ŝia koro ĉesis bati tri apartajn fojojn, kaj ĉiun fojon, ŝi reviviĝis. La plej malbona fojo estis la lasta, kiam ŝi sangis en sian cerbon. Tamen ŝi finfine resaniĝis, ŝajne, kaj ambaŭ ĝemeloj alvenis hejmen.

Dum preskaŭ tri jaroj, ĉio estis pli malpli en ordo, krom tio, ke Savannah maturiĝis pli malrapide ol ŝia ĝemelo. Ekzemple, ŝi ankoraŭ ne povis promeni, kvankam ŝi

povis rampi tre rapide. Kaj ŝi ne povis paroli pli ol kelkajn vortojn, kvankam ŝia ĝemelo povis paroli tre bone. Ĉar ŝi ne maturiĝis sufiĉe rapide, dum la pasintaj du jaroj ni portis ŝin al neŭrologo ĉiumonate, kaj ĉiufoje li ekzamenis ŝian cerbon per ultrasono. Ŝia neŭrologo diris al ni, ke ŝi verŝajne havas iom da cerba damaĝo pro la sangelfluo, kiun ŝi travivis en la malsanulejo. Sed li ankaŭ diris, ke ŝi alimaniere ŝajnas sana, kaj ni ne devas zorgi. Sed nur du semajnoj antaŭ ŝia tria naskiĝtago, mi kaj mia edzino rimarkis ke ŝia mano preterpase mistrafas ĉion, kion ŝi volas preni, kaj ŝi ne plu povas rampi sen falo. Plej ĝena por mi estis la fakto ke ŝi havis kapdoloron, kiu eble plidoloris kaj malplidoloris, sed neniam ĉesis. Ŝia neŭrologo ne sciis kial ŝi faris tion, sed denove diris al ni ke ni ne devas zorgi, kaj preskribis medikamenton por ŝia kapdoloro. Ambaŭ mi kaj mia edzino estas bestkuracistoj, do, kiam ŝi subite blindiĝis du tagojn antaŭ sia tria naskiĝtago, ni subite konstatis, kio okazas ĉe Savannah!

(Legu la duan parton morgaŭ.)

Noto de la aŭtoro: Merkredon nokte ni havis plezuron aŭskulti bonegajn muzikistojn en la gufujo. Mian koron aparte tuŝis la lulkanto de nia gastgitaristo. Lia kanto preskaŭ plorigis min, kaj kvankam mi estas ja nekuracebla romantikulo, mi preskaŭ neniam ploras. Do tuj poste mi demandis al mi, kial tiu lulkanto tiel tuŝis mian animon. Mi laste ludis gitaron antaŭ ses jaroj, kiam mi ludis lulkanton al mia filino, kaj poste neniam plu. Antaŭe, mi ĝoje ludis gitaron dum horoj preskaŭ ĉiunokte, sed poste neniam plu.

“Kial ne?”, vi eble demandas. Tio estas bona rakonto, plenplena je kompatato, kanajloj, kaj heroismo (principe de mia edzino). Ĝi estas preskaŭ kiel medicina mistero-romano. Kaj mi promesas, kvankam ĝi komenciĝas iom malhele, ke ĝi havas feliĉan finon. Eble vi ne kredos ĝin. Eĉ nun mi mem povas apenaŭ kredi ĝin, kaj mi travivis ĝin. Sed mi ĵuras: ĉio, kion mi diros al vi, estas tute vera. Ĉar ĝi estas iom longa rakonto, kaj ankaŭ ĉar ĝi aspektas kiel drama romano, mi prezentos ĝin felietone, en apartaj “klifpendantaj” ĉapitroj.

Enigmosolvo

Se Ambo estas kavaliro, Bambo kaj Ĉambo estas friponoj. Ĉambo estas malverema, do Dambo kaj Edvardo estas kavaliroj. Edvardo estas verema, do Ambo estas fripono. Sed Ambo estas kavaliro. Estas kontraŭdiro!

Ambo devas esti fripono. Do, Edvardo devas esti kavaliro.

Se Bambo estas kavaliro, Ĉambo kaj Dambo estas ankaŭ kavaliroj. Ĉambo diras, ke Dambo aŭ Edvardo estas fripono, sed tio estas kontraŭdiro, ĉar Dambo kaj Edvardo estas kavaliroj.

Do Bambo devas esti fripono. Do Dambo devas esti fripono. Do Ĉambo devas esti kavaliro. Nun, ni finis!

Resume: Ambo, Bambo, kaj Dambo estas friponoj; Ĉambo kaj Edvardo estas kavaliroj.



“Hej! En tiu ĉi ludo oni ne rajtas uzi Volapukon!” (Dankon al Tim pro la foto.)